

Leterkesto 6.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 1990-012-A-3, majo 31

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo90-012/SRI-1990-012-A-3-Claude-GACOND-Leterkesto-VI.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia. Kiel ni diris en la pasintaj elsendoj malfermante nian leterkeston, alvenis mesaĝoj el 36 landoj de 166 aŭskultantoj. Al tiuj skribintoj ni respondas laŭ la alfabeto ordo de ilia familia nomo.

Jürgen KÜHL en Burnaby (Kanado) sufiĉe bone ricevas niajn elsendojn per sia radio-aparato kaj ankaŭ intimiĝis kun niaj radio-prelegoj pere de registraĵoj, kiujn li akiris ĉe la aŭdvida sekcio de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA). Li ŝatus ricevi kopion de manuskriptoj el pluraj prelegaroj, interalie pri mia prelegaro pri la svisa filozofo Denis DE ROUGEMONT kaj pri ties verko "La Estonteco estas nia Afero". Tio kuraĝigas nin redediĉi nian atenton al tiu aŭtoro kaj eble al aliaj svisaj pensuloj, kaj havigi poste niajn tekstojn al la interesataj aŭskultantoj tra la kanalo de nia Svisa Esperanto-Revuo, la organo de Svisa Esperanto-Societo. Ĝi ĉesos esti monata revueto ĝuste por povi eldoniĝi sub la formo de temaj numeroj. En la nuna situacio estas malfacile kopii manuskriptojn, kiuj ne estis verkitaj por esti poste disdonitaj al interesatoj. Sed la teknikaj progresoj faras, ke nun ni registras niajn radio-prelegojn sur tajp-disketojn, kiujn ni povos poste facile uzi por pergazeta publikigo. La retajpado ne estos necesa, nur la stila adapto al legota uzo, dum ni pensis ilin por aŭdota utiligo. Niaj aŭskultantoj ne ĉiam imagas, kiom malsamas stile artikoloj laŭ ilia uzo, ĉu radiofonia, ĉu revua, ĉu prelega. Mats LANDFORS en Sundsvall (Svedio) tra la kanalo de nia radio direktas tre precizan peton al CDELI. Li ŝatus scii, ĉu tiu arkivejo posedas vortaron de la lingua ignota. Ni ekzamenigos tiun demandon. Jiri LAUBE en Roudnice (Ĉeĥoslovakio) sendas regule aŭdraportojn kun komentarioj. Prelego pri la verko Interpopola Konduto de Edmond Privat vekis ĉe li tiun ĉi reagon:

A.- "La libro Interpopola Konduto estas vera lernolibro de internaciismo. Mi trovis ĝin antaŭ multaj jaroj en paperaj forĵetaĵoj, difektitan. Mi bindigis ĝin kaj kelkfoje legas. Ankaŭ nun via prelego instigis min denove preni ĝin. Vere mirinda homo, Edmond Privat. Nun mi malfermis la libron sur la paĝo 36-a kaj legas la prognozon pri Pollando de Miskiewicz. Dio donu, ke la profetaĵo plenumiĝu almenaŭ nun kiam ŝajnas, ke per la komenco de la nova jarmilo ekestos iom da toleremo kaj repaciĝo."

Cl.- Josef LECHERMEIER en Ingolstadt-Irgertsheim (Germanio okcidenta) redaktis informilon titolitan Esperanto sur mallongaj ondoj. Ĉar li informiĝas pri nia opinio, mi proponas, ke en venonta eldono li skribu «Esperanto per mallongaj ondoj» aŭ eĉ «Esperanto per kurtondoj». Ofte la esperantistoj ne bone komprenas la signifon de *per*. Nun mi parolas al vi *per* radio-ondoj, ne kun radio-ondoj. Tre volonte ni ricevos specimenon de ĉiu eldono de tiu informilo, kiu ankaŭ redaktiĝis en la germana kun la titolo Esperanto auf Kurzwelle. La prepozicio *auf* ĝenerale tradukiĝas per *sur* en esperanto. Tial la eraro en la titolo de la koncerna informilo. A. LEGRET en Vire (Francio) pro maljuniĝo persona (83 jaroj) kaj de lia radio-kaptilo ne povas plu rekte kapti niajn elsendojn. Pri Svislando li intimiĝis dankal la libro La Fenomeno Svislando. Kaj multajn verkojn de Edmond PRIVAT li posedas. Leon LEGROS en Lambersart (Francio) salutis dirante:

A.- "Mi ricevis vian elsendon sufiĉe bone. Daŭrigu por nia plezuro."

Cl.- Saluton al Marcela LENKOVA en Brno (Ĉeĥoslovakio), al la anoj de Libera Esperanto Asocio en Düsseldorf (Germanio okcidenta), al Ramon LINARES VALLS en Igualada (Hispanio), kiu ĉeestis la inaŭguron de esperanto-monumento en Sabadell. Li skribis:

A.- "Kiam mi ĉeestis la inaŭguron de tiu monumento pri kiu mi fieras kiel kataluno, mi aĉetis kelkajn bildkartojn samajn al tiu ĉi, kaj tuj rememoris vin kaj viajn petojn de korespondo."

Cl.- Nia kataluna aŭskultanto sciis, ke la koncernan poŝtkarton ni konservas en la esperanto-arkivejo CDELI en la biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds. Granda ruĝa metala monumento kun trua stelo en tute moderna kvartalo. Tiu monumento estas verŝajne videbla el sufiĉe fore longe de la avenuo. Jacek LISOWSKI en Rzeszow (Pollando), sendis sian adresŝanĝon. Li konstatas, ke translokiĝo estas temporaba okupo, kiu perturbas eĉ la regulan radio-aŭskultadon.

A.- Ni dankas ĉiujn, kiuj nin informas pri siaj adresŝanĝoj.

Cl.- Amikecojn al Girolamo LUCCHETTA en Monastier (Italio), Christian LE MAIGNAN en La Chapelle-Caro (Francio), Cornelius J. MACKOWN en State College (Usono) fuŝaŭdis partojn de elsendo dediĉita al la ĉeroka-lingvo kaj al la ĉeroko BilJy WALDEN. Ni provos havigi al li la dokumenton, sur kiu estis bazita la elsendo. Rokuro MAKABE en Frankfurt am Main (Germanio okcidenta) skribis:

A.- "Hodiaŭ mi volis kapti Radio Japan kaj aŭdiĝis tute klare via elsendo pri Edmond Privat en Pollando. Mi esperas, ke tiu feliĉa hazardo okazos ofte."

Cl.- Kaj li petis la elsend-programon, kiun ni sendigos al li. Ni profitas la okazon por diri al ĉiuj, kiuj ne ricevas la programon de Svisa Radio Internacia, ke ili ne hezitu ĝin peti skribante al:

A.- Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Berno 15, Svislando. Mi ripetas.

Cl.- Wâner MARLIERE ARRUDA en Uba (Brazilo) interese skribas:

A.- "Ĉiutage, dum la komenco de nokto mi klopodas ĉe mia radioaparato por aŭdi vian tre bonan kaj utilan programon. Mia urbo Uba ne estas granda, ĉirkaŭ 100'000 da loĝantoj. Ni havas Esperanto-Klubon Johano Emesto, kiu funkcias ekde 1959, kaj ankaŭ faras esperanto-kurson por komencantoj, gvidata de f-ino Edina DE BARROS RELS. Mi estas vicprezidanto de nia Esperanto-Klubo kaj fakdelegito de UEA en mia urbo pri elektra inĝenierado."

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond daŭrigos la salutadon al la geaŭdantoj la venontajn semajnojn. Ĝis reaŭdo!